OKA JARO / No. 93

la juna vivo

DATO SEPTEMBRO '45 MONATA ORGANO DE TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

## PREĜO SUB LA VERDA STANDARDO.

Al vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de l'amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro:
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nur kredo de koro.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro
Ĉe via altaro.

Homaron vi kreis, perfekte kaj bele,
Sed ĝi sin dividis batale;
Popolo popolon atakis kruele,
Frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
Redonu la pacon al la infanaro
De l'granda homaro!

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l'homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron;
Donacu vi benon al nia laboro,
Donacu vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Ni tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos;
Ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l'mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj!
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen, senfine!

## KELKAJ PENSOJ EL „ORIGINALA VERKARO".

Kiel fundamentan leĝon de niaj principoj ni rigardas la regulon: „Agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco."

Neniam ni devas malami aŭ persekuti iun pro tio, ke lia kredo estas alia ol nia.

Lasante al ĉiuj homoj plenan liberecon havi tian internan kredon, kiu ŝajnas al li plej bona, ni proponas nur krei neŭtralan eksteran kadron, kiu povas etike, more kaj komunume unuigi ĉiujn memstare pensantajn homojn sendepende de tio, kiaj estas la filozofiaj, teologaj kredoj de ĉiu el ili.

La veraj muroj inter la homoj estas nur la malsameco de la lingvoj, la relegiaj, politikaj, ekonomiaj kaj klasaj diferencoj.

## LA JUNA VIVO EN „LA JUNA VIVO".

Falköping, Pasko 1941.

...... Kiam mi hieraŭ tralegis la dec.-januaran numeron kaj venis al la artikolo „*Vivo-ĝoj' Sen lim*" ... *Mia taglibro pri la dua Internacia Junular-Kongreso en Belgio,* tiam mi ekvidis nomon, kiun mi tre bone konas, nome Rein Schiplof, unu el miaj plej fidelaj korespondantoj. Li kaj mi jam delonge amike korespondas, kaj ankoraŭ, spite ĉio sendas leterojn unu al la alia.

Mi ja sciis, ke li partoprenis en la belga kongreso, sed tamen estis surprizo tiel, en gazeto, legi lian nomon.

Ni esperantistoj, ni sentas nin precize kiel granda familio, estas strange, sed fakto! Oni diras ofte al ni: „Kial vi korespondas kun iu nekonata eksterlandano? Ne povas esti ĝojige aŭ utile."

Tiam mi respondas: „Ni esperantistoj, kvankam ni ne persone renkontis unu la alian, tamen ne estas fremduloj: Ni havas la samajn idealojn, kaj vole nevole tre baldaŭ estas kiaj malnovaj konatuloj." G. Blomberg (Svedujo).

Gouda, la 6 an de aŭg. '45.

...... Mi sciigas al vi, ke ni en Gouda sentas ankoraŭ la saman entuziasmon por TJO, kiel antaŭe, kaj mi ankaŭ povas komuniki al vi, ke ni senescepte ĝojas, ke TJO denove reprenis sian gravan laboron por la ideo de Zamenhof, la internacia lingvo Esperanto. P. v. d. Star.

Geleen, la 27an de julio '45.

...... Dumvintre vizitis nin ofte angla soldat-amiko kaj parolante pri ĉio ni venis je tio, ke ankaŭ li estas ano de TJO kaj li rakontis ke en Anglujo TJO nun estas la plej „potenca" Esperanto-organizo. Vi povas imagi, ke mi ege ĝojis, aŭdante tion. E. Burgler Jezsó.

...... Nu, ek al laboro por la starigo de la plej potenca junularmovado en la mondo. John Holland.

## El la TJO-bulteno de nia brita sekcio.

La liberigo de nia lando ebligis la rekomencon de la Esperantista laboro. Preskaŭ ĉiuj movadoj en Francujo denove vivas; kursoj rekomencas en multaj lokoj. Estas necese, ke ankaŭ TJO ne restu malantaŭ la aliaj movadoj, kaj mi jam komencis la restarigon de nia franca sekcio por la renovigo de kontakto kun autaŭmilitaj anoj kaj la varbado de novaj anoj. Marcelle Turin (Franca Ĉefperantino de TJO)

Mi ĵus algluis esperantan kovertan glumarkon sur la frontan tubon de mia biciklo por altiri la atenton de aliaj homoj. La malantaŭa kotŝirmilo ne taŭgas por tia afiŝaĵo. Mi konsilas al aliaj homoj, ke ili faru simile. Clifford Lowe.

Antaŭ ĉirkaŭ kvin monatoj mi vidis afiŝon pri Esperanto ĉe Tottenham Court Road Stacio en Londono. Mi notis ĉi tiun reklamon. Iom poste, mi legis reklamon en gazeto. Mi aĉetis poŝtmandaton, kaj sendis ĝin al la Brita Esperanta Asocio por ricevi la Popularan kurson pri la internacia lingvo. Mi diligente studis la Esperantan lingvon, kaj post tri monatoj mi facile povis legi facilajn rakontojn. Nuntempe mi povas legi „Esperanto Internacia" (la oficiala gazeto de IEL) kvazaŭ oni verkis ĝin angle. Mi studis Francan kaj Latinan, kaj mi jam pruvis, ke Esperanto estas multe pli facila ol tiuj ĉi lingvoj. Alan Corré (13-jara)

## KOMUNIKOJ DE T.J.O.

*Estraro.* Tuj post la liberiĝo de Ned. la estraro oficiale rekomencis sian laboron, kvankam la poŝtaj kaj vojaĝaj malfacilaĵoj bremsis la agadon. Ni starigis la kontakton kun niaj diverslandaj ĉefperantoj kaj serĉas anstataŭantojn por la ĉefperantoj, kiuj pro diversaj kialoj ne povas resti sur siaj postenoj.

La dua estrarkunveno okazis la 12an de aŭg. en Koedijk „La Juna Vivo" transiris tute al T.J.O., pro kio do ĝi nun definitive fariĝis la oficiala organo de nia organizo. Pro tio ni decidis ne daŭrigi la eldonon de „La Peranto" Ni petas la specialan atenton de niaj membroj por la jenaj decidoj: La jarkotizo de T.J.O. estas: 2 ned. guldenoj por aspirantaj membroj (malpli aĝaj ol 14 jaroj) kaj 2,50 ned. gld. por aktivaj kaj subtenantaj membroj, ĉio inkluzive jarabono al „La Juna Vivo". La kotizo por simpatiantaj membroj (ne esperantistoj) estas 1 guldeno jare, eventuale inkluzive nacilingva propagandorgano aŭ informilo. Nura jarabono al L.J.V. kostas 1,50 gld. La kotizo de T.J.O. estos destinita: 0,50 gld. por la internacia laboro; 0,50 gld. por la enlanda laboro, 1,50 gld. por L.J.V. La kotizo de la simpatiantoj estos *entute* por la enlanda laboro. Eventualaj donacoj estos por la int. laboro. Ni fondis „T.J.O. centron", prizorgata de f-ino N. Kool en West-Graftdijk, N.H., Ned. Ĝiro no. 382363. Ĉi-tiu centro prozorgos: *ĉiun membroadministradon* (do ne plu la sekr.), *ĉiun enkasigon de kotizoj* (do ne plu la kasisto), *ĉiun vendadon kaj ekspedadon* de eldonaĵoj (do ne plu L.J.V. aŭ la propaganda servo). Por ĝeneralaj organizaj kaj propagandaj aferoj oni turnu sin al la sekr., por ĝeneralaj financaj aferoj al la kasisto. Raporto pri la estrara laboro dum la milito siatempe aperos.

*Belgio.* Nia ĉefperantino pro familiaj cirkonstancoj deziras abdiki; la estraro interrilatas pri anstataŭanto.

Kun „Flandra Esp. Instituto" renoviĝis la rilatoj.

*Francio.* De nia franca ĉefperantino ne jam envenis raporto, tamen ni aŭdis, ke ŝi vigle laboras por T.J.O. kaj jam varbis 36 novajn anojn.

En la franca kongreso de ĉiuj esperantistoj oni decidis starigi T.J.O. grupojn en Francujo. Tiun taskon transprenis G.E.E. (Grupo de Esperantistaj Edukistoj).

Ni ricevis favorajn komunikojn de S. Stuit, peranto por Nordfrancio.

*Nederlando.* La unua membro-kunveno okazis la 12an de aŭg. en Koedijk. Por pli efikigi la organizadon en Ned. oni elektis laborkomitaton (ĝis nun la ĝen. estraro okupis sin samtempe pri Ned.). Tiu komitato konsistas el: Henk Uitenbogaard, Koekkoekstraat 22, Hilversum (ĉefperanto), Guus Bankersen (fako „simp. membroj") adreso T.J.O. centro, West Graftdijk; J. Geus, Koedijk (N.H.) kaj Maartje Seilberger, Siondwarsstr. 16, R'dam. Eble la komitato pligrandiĝos per funkciuloj por diversaj fakoj.

La komitato ellaboras laborprogramon. Oni decidis aliĝi al la N.J.G. (Ned. junular-komuno). „De Esperantist" aperos plej verŝajne en Septembro. Envenis invito por ned. infanoj de danaj esperantistoj; la komitato rilatos pri tio kun la koncerna oficejo. Post la laborkunsido Schut prelegis pri „La utilo de la „filmservo" kaj „Esperanto-Intruado" kaj fine prezentis la T.J.O. filmojn. Entute estis tre sukcesa kunveno, kiun malgraŭ la vojaĝaj malfacilaĵoj ± 70 anoj el ĉiuj partoj el la lando ĉeestis.

Al ĉiuj ned. Esp. organizoj ni sendis proponon pri kunlaboro.

*Svisio.* Nia svisa ĉefperanto, Walter Kobelt, fartas bone kaj sendis proponon por gastigi ned. infanojn ĉe Svisaj esperantistoj.

*Anglio.* Pro spacomanko ni ne povas enpresigi entute la raporton de nia brita ĉefperanto, J. W. Holland pri T.J.O. en Britio dum la milito. El ĝi montriĝas, ke niaj angla kaj kimra ĉefperantoj post la envado en Ned. kunigis la fortojn por daŭrigi la T.J.O. laboron sendepende de la estraro. Ili sukcesis konduki nian britan sekcion al granda kresko; je la fino de la lasta adm. jaro (1944) T.J.O. nombris tie 868 anojn! La brita ĉefperanto konservis krome la kontakton kun multaj perantoj kaj membroj ekster Britio kaj eĉ varbis novajn anojn en diversaj mondpartoj. Niaj anglaj amikoj eldonis propran Bultenon kaj kelkfoje la gazeton „La Peranto"; ili aranĝis ekzamenojn; konkursojn por la verkado en Esperanto, starigis gramafondiskan servon por izolitaj anoj kaj libro-servon. La T.J.O. filmoj daŭrigis sian rondvojaĝon kun granda sukceso! Plue ili okazigis junular-kunvenojn en Birmingham, Cardiff kaj Bleadon kaj eĉ faris antaŭpreparojn por la venonta internacia junular kunveno, kiu tamen supozeble povos okazi ne antaŭ 1947. La raporto de nia brita ĉefperanto, kiu tuj kiam eble pli detale aperos, finas per la vortoj: La nuna pozicio en Britujo estas bonega. La laborado de ĉiuj perantoj kaj aliaj geamikoj tra la lando alportis bonegajn fruktojn, kaj ni estas certaj, ke estontece ni povos konstrui eĉ pli grandan sekcion ĉi tie. Ni faros nian eblon alvoki la junularon en Britujo al nia standardo, kaj ĝojos helpi en la kreado de vere forta kaj gravega internacia junulara movado tra la mondo dum la postmilitaj jaroj.

Ek al la venko! J. Holland.

## KORESPONDRUBRIKO.

Bonvolu sendi viajn korespondadresojn al jenaj geamikoj:
Por Anglio al: Sro J. Heath, instruisto, Ipswich, Suffolk.
Por Fancio al: S.ino Marcelle Turin, Trépot, Doubs.
Por Nederlando al: Sro Krijt, Veeteeltstr. 156, Amsterdam.
Enfermu poŝtmarkon por respondo. Kiom eble plej baldaŭ vi ricevos korespondadresojn.
Flandra Esperanto-Instituto senpage enpresigos korespondadresojn de TJO-anoj en Flandra Esperantisto. Adr.: P. v. Humbeekstr. 3, Brussel W, België.

## BELA DEKLAMO.

Dum societa kunveno oni petis al bela rusa aktorino, ke ŝi deklamu ion por la gastoj. Ĉar ŝi ne povis elpensi ion konvenan tiumomente, ŝi anoncis, ke ŝi deklamos ion en la rusa lingvo. Ŝi do tion faris, kaj akompanis la deklamadon per energiaj gestoj. La gastoj entuziasme aplaŭdis. Poste oni demandis al ŝi pri la speco, kiun ŝi deklamis. „Ho," respondis la aktorino, „tiu peco ne havas titolon. Mi nur nombris de unu ĝis ducent tridek en la rusa lingvo."

## ĈU SAMIDEANE?

Post kvar jaroj da germana okupado, la Esperanto-grupo denove kunvenis en sia ejo. Samideano N rakontis: ‚Komence mi portis la verdan stelon, sed forprenis ĝin de la jako sekve al malagrabla incidento. Iutage surstrate paŝis al mi renkonte, radiante pro feliĉo kaj kun etendita mano, germana soldato, salutante per: „Finfine samideanon." Vi komprenas, ke ion tian mi ne deziras sperti duan fojon."

La blinda, fanatika, sendistinga sed laŭmoda malamo do ankaŭ inter ni trovis adeptojn. Ĉu vi scias, samideano N, kion *mi* estus farinta vialoke? Ne unu, sed ambaŭ manojn mi estus preminta de la germana samideano, kiu evidente restis fidela kaj enkore gardis nian idealon spite al sep jaroj da nazi-reĝimo.

El „Flandra Esperantisto".

Redakcio: E. van Veenendaal—Bouwes, Limmen, Ned. / Administrado: T. J. O. Centro, West Graftdijk N.H., Ned., ĝironumero 382363.